

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Herongate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 6, N-RO 5-6

MAJO-JUNIO 1942

La "Sankey" Deklaracio pri LA RAJTOJ DE L'HOMO

1. Enkonduko, speciale verkita por *Esperanto Internacia* de H. G. WELLS

Mi tre ĝojas, ke la Internacia Esperanto-Ligo estas preta diskonigi la Sankey-Deklaracion pri la Rajtoj de l'Homo, de kiu mi estas, mi konfesas, la persista advokato, sed neniasence la respondeca patro. Ŝajnas al mi, ke necesas havi preta, en tiom da lingvoj kiom eble, UNU SAMAN DOKUMENTON (pardonu la majusklojn !), tiel ke ĉie oni komprenu tion kio estas celata, sen ebleco de elirejoj aŭ evito. Mi nun faras ĉion eblan havigi kiel eble plej multe da kontrolitaj tradukoj, kaj mi estos tre kontenta se la ideo allogos Esperantistojn, kaj se ili kunlaboros kun miaj necese tre amatoraj kaj nebone subtenataj penoj tion plenumigi.

Jen resumo de la historio pri la Sankey-Deklaracio.

Mi estis membro de la *Crewe House Komitato* por propagando al Germanujo dum la 1914-18 milito, kaj, kune kun D-ro J. W. Headlam-Morley, mi pretigis difinon de militceloj kiun la Komitato submetis al la Brita Fremda Ministerio por akcepto aŭ aliigo. Ni klarigis, ke se ni ne sciis la celon de nia propagando, estus neeble plene efektiviĝi ĝin. La Fremda Ministerio ne plenumis nian peton ; la celo restis tute mistera, kaj tial Prezidanto Wilson sukcesis akceptigi siajn "Dek kvar Punktojn" kiel la kondiĉoj por la germana cedo kaj la bazo de tiu pakto de Versailles, kies sekvojn ni ankoraŭ ĝuas.

Angla libro, *La Rajtoj de l'Homo*, priskribas la ĝermon de la ideo pri la Deklaracio en la ĵurnalo "The Times". La ideo pri vigla organizo de la diskutado estis efektivigita de S-ro Ritchie Calder. Li persvadis la "Daily Herald" enkonduki la diskuton kiel ĵurnalan ĉefafon. Ĝi komenciĝis je la 5a de Februaro 1940, kaj dum unu-du tagoj mi ripetis la enhavon de la verketo *La Rajtoj de l'Homo*. Poste ni petis komentojn. Je la 8a troviĝis artikoletoj de S-ro Harold Nicolson, Sir Richard Gregory, kaj S-ro William Holmes, la Prezidanto de la Sindikata Konferenco ; je la 9a, partoprenis la diskuton la Ĉefepiskopo de York, Profesoro Archibald Main (Ĉefulo de la Skota Eklezio), kaj Generalo Carpenter de la Sav-Armeo. Je la 14a S-ro J. B. Priestley, Sir Walter Langdon Brown, kaj S-ro John Marchbank, la

Ĝenerala Sekretario de la Nacia Unuiĝo de Fervojistoj, kontribuis artikolojn. Je la 15a, la forpasinta H. W. Nevinson, Profesoro John Macmurray, kaj S-ro George Gibson, Sekretario de la Unuiĝo de Laboristoj en Mensaj Malsanulejoj kaj Institucioj, faris gravajn kontribuojn. Je la 16a la verkisto H. M. Tomlinson, Profesoro J. B. S. Haldane kaj Profesoro Lancelot Hogben faris tre utilajn kritikojn, kaj je la 17a la Dukino de Atholl kaj S-ino Ayrton Gould, la Prezidanto de la Laborista Partio, proponis amendojn. G. B. Shaw aprobis kaj plifortigis la projekton per brila artikolo je la 19a, kaj je la 20a aŭstra ekzilo, Bruno Heilig (el Dachau), S-ro Ronald Kidd, la Sekretario de la Nacia Konsilantaro por Civilaj Liberaĵoj, Profesoro C. E. M. Joad, kaj Sir Richard Acland, Parlamentano, publikigis artikolojn, sekvate de Lordo Lytton kaj S-ino Mary Agnes Hamilton je la 21a. Je la 24a alvenis longaj komentoj el Berlin kaj el la "Popolo d'Italia", avertante la germanan kaj italan popolojn kontraŭ "danĝeraj ideoj". Evidente la diskutado eksterlandeniĝis, kaj la ĵurnalo de la 26a enhavis leterojn de S-ino Marczali, la Sekretario de la Hungara Angle-parolanta Rondo en Budapest, kaj de Profesoro Norman Bentwich, Profesoro pri Internaciaj Rilatoj en la Universitato de Jerusalem. Alvenis kablogramo je la 28a de Februaro el Kotagiri de Margaret Cousins, Fondinto kaj eks-Prezidanto de la Tut-Hinduja Virina Konferenco: "Necesas enkalkuli virinojn per ŝanĝo de la titolo de la diskutado al Deklaracio pri Homaj Rajtoj". Persone mi opinias tion bonega propono kaj mi rekomendas ĝin al la atento de la Esperantistoj.* Mi ne plu memoras kial la Prepara Komitato ne akceptis ĝin. Will Lawther, Prezidanto de la Minista Unuiĝo de Britujo, kaj Pastro J. S. Cannock, S.J., Profesoro pri Morala Filozofio ĉe Heythrop College, Oxfordshire, ankaŭ skribis je la 26a, kaj S-ro de Madariaga, antaŭa Hispana Ambasadoro en Parizo kaj Washington, S-ro George Hicks, la sindikata estro, kaj S-ro Kingsley Martin, redaktoro de la "New Statesman", sekvis je la 27a. Pluraj leteroj de gravaj virinoj aperis je la 28a, kaj oni anoncis ke simila diskutado komenciĝis en la organo de Gandhi, la "Hindustani Times". La forpasinta George Lansbury skribis je la 29a. Je la unua de Marto ni ricevis tre amikajn duon-akceptojn de Majoro Attlee, S-ro Arthur Greenwood, kaj S-ro Herbert Morrison. Tiutempe Majoro Attlee estis la oficiala estro de la Opozicio en la Brita Parlamento. Samtage ankaŭ aperis artikoloj de Patro Lewis Watt, S.J., kaj Patro Francis Woodlock, S.J. Krome, multaj miloj da leteroj alvenis ĉe la redakcio de la "Daily Herald". Granda nombro de tiuj leteroj dividiĝis en specialajn klasojn: ekzemple, la kontraŭ-vivisekciistoj, la personoj kiuj deziris alfiksigi al la Deklaracio ian formon de religio aŭ senreligiĝo, la sennombraj homoj kiuj kontentigis sin dirante ke necesas Deklaracio ne pri Rajtoj sed pri Devoj, kaj tiel plu. Tamen ĉion originalan aŭ trafan oni apartigis, kaj notis, kaj presigis en la "Daily Herald". Prepara Komitato ekkomencis labori ĉe tiu amasaĵo. Estis malfacile kunvoki kaj kunteni tiun komitaton, kaj eĉ pli malfacile ree kunvoki ĝin pro la postaj ŝanĝoj kiuj necesiĝis. Kiam la kunvenoj okazis, oni diskutis ĝis plena lacigo, netaŭgaj frazoj enŝteliĝis kaj gravaj punktoj preterpasiĝis, kaj pena interkorespondado estis necesa por ĝustigi tiujn eraretojn. Malfruaj sed gravaj kritikoj envenis kaj necesigis modifojn, speciale rilate al Alineo 6. La komitato konsistis el: Lordo Sankey (Prezidanto), Sir Norman Angell,

* *Noto de la Red.*: La angla teksto uzas la vortojn "Rajtoj de la Viro", ĉar kutime en la angla lingvo tia uzado enkalkulas ankaŭ virinojn.

Rt. Hon. Margaret Bondfield, Sir Richard Gregory, Lordo Horder, Sir John Orr, S-ro H. G. Wells, S-ro Francis Williams, S-ino Barbara Wootton, kaj S-ro Ritchie Calder (Sekretario). La instrukcioj estis, ke ĝi pretigu resumon de la tuta amaso da opinioj kaj elserĉu kiel eble plej grandan interkonsenton pri socia virto. Tio estas deklaro pri intenco, kaj ne plano pri politiko aŭ metodo. Unue, ni diris, ni interkonsentu pri la bono dezirata, kaj poste ni provu atingi ĝin. Tion ni deziras havigi el la malfeliĉoj de la nuna milito. Revolucio estas klare postulata; evidentiĝas, ke ia mond-ordo kiu ne donas la celatajn rajtojn estas malsukcesa; de tio sekvas la metodoj, taktiko kaj strategio per kio oni atingos la celon. Tio ne pritraktas iajn religiajn postulojn, sed estas klare implikate ke ia religio, kiu neas tiujn rajtojn al iu homo, estas malbona religio. (*Tradukita*).

2. La Sankey-Deklaracio pri la Rajtoj de l'Homo

1. La Rajto Vivi

La vorto "homo" en ĉi tiu deklaro signifas ĉiun vivantan homon sen ia distingo rilate al aĝo aŭ sekso.

Ĉiu homo estas kunheredanto de ĉiuj naturaj rimedoj kaj de la potencoj, inventaĵoj, kaj eblecoj amasigitaj de niaj antaŭuloj. Li rajtas ricevi, laŭ la provizo de ĉi tiuj rimedoj kaj sen distingo pri raso, koloro, kredo aŭ opinio, la nutron, inkluzive de la kuracado necesa por la atingo de la plenaj eblecoj pri korpa kaj mensa evoluo de la naskiĝo ĝis la morto. Malgraŭ la diversaj kaj malegalaj kvalitoj de individuoj, oni konsideros ĉiujn homojn tute egalaj sub la leĝo, egale gravaj en la socia vivo, kaj egale rajtigitaj al la respekto de iliaj kunvivantoj.

2. Protekto de Neplenaĝuloj

La naturaj kaj rajtaj protektantoj de homoj ne sufiĉe aĝaj por sin protekti estas iliaj gepatroj. Kiam tiu protektado ne estas ebla, tute aŭ parte, la komunumo akceptos la respondecon aŭ provizos alternativajn protektantojn, respektante tamen la familiajn tradiciojn de la infano.

3. Devo al la Komunumo

Estas la devo de ĉiu homo, ne nur respekti, sed ankaŭ subteni kaj pligrandigi la rajtojn de ĉiuj aliaj homoj tra la mondo. Plue, estas lia devo kontribui al la komunumtiam servadon, kia certigos la faron de tiuj necesaj taskoj al kiuj la stimuloj ne ekzistas en libera socio. Nur per la fardo de sia kvoto da servado homo povas pravigi sian lokon en la komunumo. Neniu homo estos devigata fari militan aŭ alian servadon kontraŭ kiu li havas konsciencan opinion, sed tiu kiu ne plenumas ian ajn socian devon restos sen voĉdonrajto kaj sub kuratoreco.

4. La Rajto al Scio

Estas la devo de la komunumo doni al ĉiu homo sufiĉan edukon ebligi al li esti tiel utila kaj interesigita civitano kiel li kapablas. Plue, estas la devo de la komunumo ebligi al li la akiron de ĉia scio kaj de tia speciala eduko kia donos al li egalecon de okazo por la plibonigo de liaj apartaj talentoj en la servo de l'homaro. Li rajtas havi facilan kaj senperan aliron al ĉia informo necesa por ke li formu opinion pri tiutempaj okazaĵoj kaj problemoj.

5. Libereco de Pensado kaj Religio

Ĉiu homo rajtas plenan liberecon de esprimado, diskutado, asociiĝo kaj religio.

6. La Rajto Labori

Ĉiu homo rajtas libere labori en ia ajn legitima okupo, ricevante tian salajron kian valoras la kontribuo farita per lia laboro al la bono de la komunumo, aŭ kian havigas al li la deziro de privata individuo aŭ individuoj por liaj produktaĵoj, liaj faritaĵoj, aŭ la daŭrigo de lia laboro. Li rajtas ricevi pagitan laboron de la komunumo, kaj fari sugestojn pri la speco de laboro kiun li kapablas entrepreni. Li rajtas plene profiti pro la dezirindeco de siaj produktaĵoj kaj laboro. Kaj li rajtas ricevi pagon pro atentigo al produktaĵo aŭ pro havigo de ĝi al aĉetanto kiu alie ne povus ĝin akiri. Tion farante, li faras servon pro kiu li rajtas fari profiton. Li estas utila agento. Sed aĉeti, teni, kaj vendi denove nur por fari profiton ne estas legitima. Tio estas spekulacio; ĝi faras nenian servon; ĝi

profitas el bezono kaj ĝi povas profiti nur per la kreo aŭ daŭrigo de bezono. Ĝi rekte tentas homojn al la obsktrukcado de legitimaj profitoj, al anticipado, alproprigado, amasigado, kaj miksaĵo de kontraŭ-sociaj agadoj, kaj ĝi estas egale nelegitima por privataj individuoj kaj publikaj administraj aŭtoritatoj.

7. La Rajto al Personaj Posedaĵoj

Por siaj personaj posedaĵoj, legitime posedataj, ĉiu homo rajtas ricevi protekton kontraŭ publika aŭ privata perforto, forpreno, devigo aŭ timigo.

8. Libereco de Movado

Homo rajtas libere iri tra la mondo je sia propra elspezo. Lia privata loĝejo, tamen, kaj ia raciece limigita enfermejo kiun li okupas, povas esti enirata nur laŭ lia konsento, aŭ de iu leĝe rajtigita persono kun permesilo laŭleĝe donita. Tiel longe kiel per sia agado li ne trudas sin en la privatan bienon de iu alia civitano, kaj ne difektas aŭ malbonigas aŭ obstrukcas tion kio ne apartenas al li, nek malhelpas aŭ endanĝerigas ĝian ĝustan uzadon, nek grave difektas la feliĉon de aliaj homoj, li rajtos veni kaj iri kie ajn li deziras, sur la tero aŭ akvo, aŭ en la aero, super ia speco de tereno, montaro, stepo, rivero, lago, maro aŭ oceano, kaj ĉiuj la vastaj spacoj de ĉi tiu, sia mondo.

9. Persona Libereco

Se homo ne estas deklarita de kompetenta aŭtoritato esti danĝera al si aŭ al aliaj homoj pro mensa malnormaleco, kiu deklaro devas esti konfirmita en sep tagoj kaj poste almenaŭ ĉiujare prikonsiderita, li ne estos detenata dum pli ol dudek kvar horoj sen akuzo pri iu definitiva ofendo, nek remetita por pli longa periodo ol ok tagoj sen sia konsento, nek enkarcerigita dum pli ol tri monatoj sen proceso. Je taŭga tempo antaŭ la proceso, oni devas liveri al li kopion de la atestoj, kiujn oni proponas uzi kontraŭ li. Je la fino de la tri-monata periodo, se li ne estas juĝita kaj kondamnita laŭ la regula leĝa procedo, li devas esti senkulpigita kaj liberigita. Neniu homo estos akuzita pli ol unufoje pri unu sama ofendo. Kvankam li povas esti libere kritikata de aliaj homoj, homo havos sufiĉan protekton kontraŭ ia miskompreno kiu povas malfeliĉigi lin aŭ malutili al li. Sekreta atesto ne estas permesebla. Informoj notitaj en administraj dokumentaroj ne rajtas esti uzataj por pravigi la plej etan agon kontraŭ persona libereco. Tia dokumentaro estas nur memorigilo por administra uzado; ĝi devas ne esti uzata kiel atesto sen taŭga konfirmo en juĝejo.

10. Protekto kontraŭ Perforto

Neniu homo suferos ian vundadon sen sia propra konsento, libere donita, nek perfortan manipulado, krom kontraŭ sia propra perforto, nek torturon, punbatadon, aŭ ian alian korpan malbonagon. Li ne estos devigata suferi mensan mizeron, aŭ enkarcerigon en infektitaj, insektplenaj aŭ alie nesaniĝaj lokoj, aŭ kunigon kun insekthavaj aŭ infektitaj personoj. Sed se li mem estas infekta aŭ danĝera al la sano de aliaj homoj, li povas esti purigita, desinfektita, kvarantenita, aŭ alie detenata tiom kiom necesas por malebligi malutilon al aliaj personoj. Neniu estos punata anstataŭe per la elekto, malliberigo, aŭ malbontraktado de garantiuloj.

11. La Rajto pri Leĝfarado

La rajtoj menciitaj en la nuna Deklaracio estas fundamentaj kaj ne forigeblaj. En konvenciaj kaj administraj aferoj, sed en neniam aliaj, videble necesas ke la homoj limigu la liberan funkciadon de kelkaj el ĉi tiuj fundamentaj rajtoj. (Ekzemple, rilate al tiaj konvenciaj aferoj kiaj la reguloj pri trafiko sur la vojoj aŭ la protekto de mono kontraŭ falsado, kaj rilate al tiaj administraj aferoj kiaj urba kaj kampara planado aŭ publika higieno). Neniu leĝo, konvencia aŭ administra, devigos iun homon aŭ parton de la homaro, krom se ĝi estas malkaŝe farita kun la aktiva aŭ pasiva konsento de ĉiu plenaĝa civitano koncernata, montrita aŭ per rekta voĉdono de la plimulto aŭ per plimulta voĉdono de liaj reprezentantoj publike elektitaj. Ĉi tiuj reprezentantoj finfine estos respondecaj pro ĉiuj subleĝoj kaj pri detalaj decidoj faritaj en la plenumo de la leĝaro. En aferoj konvenciaj kaj komuna agado oni devas akcepti la decidojn de la plimulto, eltrovitajn per voĉdonaj metodoj kiuj donas efikan esprimon al individua prefero. Ĉia leĝfarado devas esti kondiĉa je publika diskutado, revizio aŭ nuligo. Neniaj traktatoj aŭ interkonsentoj estos faritaj sekrete en la nomo de la komunumo.

La fonto de leĝfarado en libera mondo estas la tuta popolo, kaj ĉar la vivo konstante fluas al novaj civitanoj, neniu generacio rajtas, tute aŭ parte, delegi ĉi tiun leĝfaran povon, neforigeble heredatan de la homaro.